

La unua printempa tago

La 21-a de marto estas nomata la unua printempa tago. Ĉi tiu nomo estas evidente simbola. Kial sed tio estas tiel? Unue, la 21-a de marto estas la tago de ekvinokso, de ĉi tiu dato la tagoj estas jam pli longaj ol noktoj. La fino de marto estas regule karakterizata per principa sango de vetero. La evoluo de vetero en unuaj monatoj de jaro nature dependas de akreco kaj longeco de vintro. Nunjare, kiam la vintro estas la plej akra kaj la plej longa en lastaj naŭ jaroj, ĉio estas malfruigita.

La unuajn simptomojn, ke vintro finiĝos kaj venos printempo, ni povas observi de la komenco de la jaro. Jam komence de januaro frajas lojto (ĉeĥe "mník jednovousý"). Ĉirkaŭ meze de januaro povas esti aŭdata la unua kanto de granda paruo (ĉeĥe "sýkora koňadra"), fine de januaro komencas ululi gufo (ĉeĥe "výr velký") kaj pariĝas leporo.

Februaro jam estas pli riĉa je simptomoj de komenco de printempo. Depende de la vetero aperas unuaj printempaj floroj heleboro (ĉeĥe "čemeřice černá", nomata ankaŭ "vintra rozo"), galanto (ĉeĥe "sněženka podsněžník") kaj leŭkojo (ĉeĥe "bledule jarní"). Iam jam en februaro floras avelo (ĉeĥe "líška obecná") kaj kaprosaliko (ĉeĥe "vrba jíva"). En februaro pariĝas lupoj, vulpoj, sovaĝa kuniklo kaj sciuro, ursino en sia vintra kuŝejo akuŝas ursidojn. Revenas unuaj migrantaj birdoj: griza ansero (ĉeĥe "husa velká"), vanelo (ĉeĥe "čejka chocholatá") kaj kampalaŭdo (ĉeĥe "skřivan polní"). Oni povas aŭdi unuajn provojojn de merlo (ĉeĥe "kos černý") pri kanto.

En marto floras de arboj betulo (ĉeĥe "bříza bělokorá"), alno (ĉeĥe "olše lepkavá"), avelo, kaprosaliko, blanka poplo (ĉeĥe "topol bílý"), nigra poplo (ĉeĥe "topol černý") kaj tremolo (ĉeĥe "topol osika"). Ekfloras tipaj printempaj floroj: anemonoj (ĉeĥe "sasanky"), hepatiko (ĉeĥe "jaterník podléška"), pulsatiloj (ĉeĥe "koniklece"), kalto (ĉeĥe "blatouch bahenní"), fikario (ĉeĥe "orsej jarní"), pulmonario (ĉeĥe "plicník lékařský"), tusilago (ĉeĥe "podběl léčivý"), hiacinto, krokusoj (ĉeĥe "šafrány"). Elkreskas printempaj fertilaj tigoj de kampa ekviseto (ĉeĥe "přeslička rolní"). Aperas jam unuaj fungoj: morheloj (ĉeĥe "smrže") kaj verpo (ĉeĥe "kačenka česká"). El vintra dormo vekigigas erinacojn kaj vespertojn. Melo (ĉeĥe "jezevec lesní") akuŝas melidojn kaj elrampas post vintro de sia kuŝejo. Pariĝas linko (ĉeĥe "rys ostrovid"). Akuŝas ankaŭ sovaĝporko, musteloj (ĉeĥe "kuny") kaj sciuro. Komenciĝas reproduktado de sorikoj (ĉeĥe "rejsci"), mikrotoj (ĉeĥe "hraboši"), arbarmusoj (ĉeĥe "myšice") kaj ondatro. Forflugas frugilego (ĉeĥe "havran polní"), kiu ĉe ni travintris. Revenas multaj specioj de birdoj, ekzemple greboj (ĉeĥe "potápky"), blanka cikonio (ĉeĥe "čáp bílý"), anasoj, nigra fuliko (ĉeĥe "lyska černá"), skolopo (ĉeĥe "sluka lesní"), galinago (ĉeĥe "bekasina otavní"), ridmevo (ĉeĥe "racek chechtavý"), ringkolombo (ĉeĥe "holub hřivnáč"), ruĝgorĝulo (ĉeĥe "červenka obecná"), nigra ruĝvostulo (ĉeĥe "rehek domácí"), kamphirundo (ĉeĥe "vlaštovka obecná"), fringo (ĉeĥe "pěnkava obecná"), verda kardelo (ĉeĥe "čížek lesní"), blanka motacilo (ĉeĥe "konipas bílý"), montara motacilo (ĉeĥe "konipas horský") kaj sturno (ĉeĥe "špaček obecný"). Komenciĝas aktiveco de iuj amfibioj: trituroj (ĉeĥe "čolci") kaj ranoj (ĉeĥe "skokani"), eble ankaŭ bufoj (ĉeĥe "ropuchy"). El fiŝoj frajas ezoko (ĉeĥe "štika

obecná"), hondrostomo (ĉeĥe "ostroretka stěhovavá") kaj coto (ĉeĥe "vranka obecná"). En malaltajaj marĉlaĝetoj povas aperi krustuloj: printempa anostrako (ĉeĥe "žábronožka sněžní") kaj lepiduro (ĉeĥe "listonoh jarní").

En aprilo ekfloras pluaj arboj: karpino (ĉeĥe "habr obecný"), kverkoj, fago (ĉeĥe "buk lesní"), salikoj (ĉeĥe "vrby"), aceroj (ĉeĥe "javorý"), frakseno (ĉeĥe "jasan ztepilý"), ĉerizarbo, prunarbo, abrikotarbo, persikarbo, pirarbo, prunelarbeto (ĉeĥe "trnka obecná"), ruga ribarbeto (ĉeĥe "rybíz červený"), grosarbeto (ĉeĥe "srstka obecná"), forsitio (ĉeĥe "zlatice převislá") kaj fine de aprilo siringo (ĉeĥe "šeřík obecný"). Floras fragujo (ĉeĥe "jahodník obecný"), printempa adoniso (ĉeĥe "hlaváček jarní"), grandflora stelario (ĉeĥe "ptačinec velkokvětý"), printempa primolo (ĉeĥe "prvosenska jarní"), leontodo (ĉeĥe "pampeliška lékařská"), lekanto (ĉeĥe "sedmikráska obecná"), tulipo kaj narcisoj. El vintra dormo vekigás zizelo (ĉeĥe "sysel obecný") kaj gliroj (ĉeĥe "plši"). Pariĝás putoroj (ĉeĥe "tchoří"), ermeno (ĉeĥe "lasice hranostaj") kaj galputoro (ĉeĥe "lasice obecná"). Revenas pluaj birdoj, ekzemple turto (ĉeĥe "hrdlička divoká"), kukolo (ĉeĥe "kukačka obecná"), kaprimulgo (ĉeĥe "lelek lesní"), upupo (ĉeĥe "dudek chocholatý"), koltordulo (ĉeĥe "krutihlav obecný"), gardena ruĝvostulo (ĉeĥe "rehek zahradní"), murhirundo (ĉeĥe "jiříčka obecná"), sovaĝa kanario (ĉeĥe "zvonohlík zahradní"). Ĉiuj birdoj komencas konstrui nestojn. Komenciĝás aktiveco de reptilioj. Aperas amfibioj: salamandro (ĉeĥe "mlok skvrnitý"), bombinoj (ĉeĥe "kuňky"), bufoj (ĉeĥe "ropuchy") kaj hilo (ĉeĥe "rosnička zelená"). Frajas iuj fiŝoj: timalo (ĉeĥe "lipan podhorní"), leŭcisko (ĉeĥe "jelec proudník"), iduso (ĉeĥe "jelec jesen"), fokseno (ĉeĥe "střevle potoční"), aspjo (ĉeĥe "bolen dravý"), perko (ĉeĥe "okoun říční"), perco (ĉeĥe "ježdík obecný"), sandro (ĉeĥe "candát obecný"). Aperas unuaj papilioj: pieridoj (ĉeĥe "bělásci"), koliadoj (ĉeĥe "žlutásci") kaj vanesoj (ĉeĥe "babočky").

Majo estas jam plena printempo, ekfloras pluaj arboj kaj floroj, revenas pluaj birdoj, naskiĝás kaj eloviĝás idoj.

Tiu procedo de printempo, kiun mi provas priskribi, estas nur teoria kaj konformas al averaga jaro. Nunjare ĉio ankoraŭ dormas. Sed tuj kiam vintro foriros, ĉio evoluos tre rapide.

Evžen Wohlgemuth